

Heinrich Heine,

En la mirida bela
Maj’

tradukita de Kálmán Kalocsay

En la mirinda bela Maj’,
dum sin burĝonoj fendis,
en mia kor’ la amon
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj’,
dum birda tril’ ne ĉesis,
al ŝi sopiron mian
konfide mi konfessis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 - †1976).*

Arg-203-1082 (2010-05-26
12:08:05)

Heinrich Heine,

En dolĉega Maj’

tradukita de Friedrich Pillath

Printempe en dolĉega Maj’,
Dum la burĝonoj krevis,
El mia koro ĝerme
Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega Maj’,
Dum birda kanto sonis,
De l’ kora mi sopiro
Konfeson al ŝi donis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).*

Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)

Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj Poemoj, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath.

Heinrich Heine,

En admirinde bela
maj’

tradukita de Hans-Georg Kaiser

En admirinde bela maj’,
dum jam burĝonoj krevis,
jen ankaŭ miakore
la amo sin eklevis.

En admirinde bela maj’,
dum birdotrill’ senbridis,
jen mi al ŝi sopirojn,
dezirojn, ekkonfidis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).*

Arg-203-431 (2004-03-24
07:33:04)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. La traduko estas korektita laŭ la lasta ŝanĝo, kiun faris s-ro Hans-Georg Kaiser en 2004-03-21.